

Thomas Moore,  
La lasta rozo

*tradukita de Antoni Grabowski*

*kun ok-liniaj strofoj*

Jen floras sola, forlasita  
La lasta rozo de l' somero,  
Dum ĝia ĉarma gefrataro,  
Velkinte kuſas jam sur tero.  
Ne estas ia flor' parenca,  
Nek roz-burgono en proksimo,  
Por interſangi la ridetojn  
Aŭ la sapirojn, laŭ kutimo.

Mi vin ne lasos, ho soleca,  
Ĉagrene sur trunketo brili;  
Ĉar la karuloj viaj dormas,  
Do iru, dormu vi kun ili!  
Foliojn viajn mi afable  
Disjetas sur bedeto jena:  
Vi kuſu apud senaroma,  
Malviva kunular' ĝardena!

Mi tiel sekvu, kiam pasos  
De l' amikeco flor' fidela,  
Kaj el brilanta amo-ringو  
Elfalos lasta ŝton' juvela.  
Ĉar kiam velkis veraj koroj,  
Sentemaj flugis for el rondo,  
Ho, kiu volus tiam logi  
Solece en malvarma rondo?

...

Thomas Moore,  
Letzte Rose

*tradukita de Friedrich Wilhelm Riese*

Thomas Moore,  
La lasta rozo

*tradukita de Clarence Bicknell*

*kun ok-liniaj strofoj*

Letzte Rose, wie magst du  
so einsam hier blühn?  
Deine freundlichen Schwestern  
sind längst, schon längst dahin  
Keine Blüte haucht Balsam  
mit labendem, labendem Duft  
keine Blätter mehr flattern  
in stürmischer Luft.

Warum blühst du so traurig  
im Garten allein?  
Sollst im Tod mit den Schwestern  
mit den Schwestern vereinigt sein  
Drum pflück ich, o Rose  
vom Stamme, vom Stamme dich ab  
Sollst ruhen mir am Herzen  
und mit mir, ja mit mir im Grab.

...

Jen la lasta rozeto  
de fora somer'!  
Ĝiaj belaj kunuloj  
jam velkis sur ter'!  
Ne restas parenco,  
ne unu rozflor'  
Partoprenas kompare  
en ĝia dolor'.

Mi ne lasos vin velki  
tutsola, ho roz'.  
Iru dormi kun ili  
en paci ripoz'.  
Nun viajn petalojn  
disjetas mi for  
Al viaj kunuloj  
sen viv', sen odor'.

Tiel same volonte  
formortus mi mem,  
Se ne plu min atendus  
amika manprem'.  
Ĉar kiu kun koro  
en tiu ĉi mond'  
Volus logi izola  
sen amo-respond'?

...

Traduko de la Angla poemo "T is the Last Rose of Summer" de THOMAS MOORE (\*1779-05-28 – †1852-02-25) en Esperanton de ANTONI GRABOWSKI (\*1857-06-11 – †1921-07-04).

Arg-531-1059 (2010-03-28 21:24:14)

Tiun ĉi poem-tradukon mi, Manfred Retzlaff, kopiis el la retejo <http://www.netlibrary.net/eBooks/Wordtheque/eo/221211.TXT>.

Traduko de la Angla poemo "T is the Last Rose of Summer" de THOMAS MOORE (\*1779-05-28 – †1852-02-25) en la Germanan de Friedrich Wilhelm Riese.

Arg-531-1061 (2010-03-29 02:00:11)

Text: Friedrich Wilhelm Riese - 1830 - (1847 in der Oper "Martha" von Flotow) - vermutlich von einem Gedicht des irischen Lyrikers Thomas Moore angeregt: „Des Sommers letzte Rose blüht hier noch, einsam rot...“ Musik: nach dem irischen Volkslied: Groves of Blarney? Siehe: <http://www.volksliederarchiv.de/text3289.html>. auf die gleiche Melodie wird gesungen

Traduko de la Angla poemo "T is the Last Rose of Summer" de THOMAS MOORE (\*1779-05-28 – †1852-02-25) en Esperanton de CLARENCE BICKNELL (\*1842-10-27 – †1918-07-17).

Arg-531-1060 (2014-02-15 14:00:59)

Mi, Manfred Retzlaff, trovis tiun ĉi poem-tradukon en folio kun kantoj prezentitaj dum la 12a jarkunveno de Germana Esperanta Fervojista Asocio (GEFA), la 12-an de oktobro 1968. Pri la tradukinto vidu la retejon [http://eo.wikipedia.org/wiki/Clarence\\_Bicknell](http://eo.wikipedia.org/wiki/Clarence_Bicknell).